

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



**Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio**
(4/2006, okt – dec)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)40 4484
Fakso: 643 8729
Retadreso:
avanco@esperanto.co.cu

Ĉefredaktoro:
NORBERTO DÍAZ GUEVARA
norberto@ssp.desoft.cu

Revizias kaj kontrolas:
JULIÁN HERNÁNDEZ ANGLIO
ALBERTO F. CALIENES
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ
JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO F. CALIENES

Reproduktado permesata
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

De la 15a ĝis la 17a de decembro, pli ol kvardek esperantistoj el ses provincoj de la lando renkontiĝis en la popola kampadejo Cajobabo [kahobabo]. Ĉi-jare la partoprenintoj en la jam tradicia Zamenhofa Metiejo ĝuis ne nur agrablan instruan programon sed ankaŭ distrajn aranĝojn. Pri tiu renkontiĝo, ĝiaj ekesto kaj estonteco vi multe legos en tiu ĉi numero. Foto: Norberto Díaz Guevara.

estimata leganto

La jarfino ĉiam estas okazo de donaco, kaj la nuna numero de Avanco donacas al vi kelkajn sciindaĵojn pri Zamenhof.

Kiel tradicie, la kuba esperantistaro renkontiĝis en la orienta regiono de la lando, ĝuste en Guantánamo, por naciskale omaĝi la iniciatinton de la lingvo internacia, kaj ankaŭ pri tio vi legos en tiu ĉi numero.

En epoko kiam la ĝenerala informa agado pli kaj pli graviĝas, ne mankos al vi komentoj pri tiu agado en la Esperanta movado, kaj pri tiu temo ni ŝatus ricevi viajn komentojn. Memoru, ke la Avancaj paĝoj estas malfermitaj por viaj kontribuajoj.

Agrablan kaj nutrivan legadon!


Kun Avancaj salutoj,

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

enhavo

15a de Decembro	3
NORBERTO DÍAZ GUEVARA	
La decembra renkontiĝo en Guantánamo	4
NORBERTO DÍAZ GUEVARA	
Gvidlinioj por informado pri Esperanto	5
2006: Agado en filioj	7
L. L. Zamenhof	8
La Zamenhofaj Metiejoj	14
LEONARDO LUNA NEYRA KAJ TIRSO ÁVILA BORY	

15a de decembro



Kun intereso scii pri la okazaĵoj dum la 15a de decembro en la historio de la homaro, kaj ĉefe en la kultura medio, mi trovis en Interreto ttt-ejon* el kiu nun mi dividas kun vi kelkajn trovojn: 1675 mortis la pentristo Jan Vermeer. 1832 naskiĝis inĝeniero A. Gustave Eiffel. 1903 naskiĝis kinisto Yasuhiro Ozu. 1966 Mortis Walt Disney. Mi aldonu, ke santage en 1995 naskiĝis la eŭro.

Tiel kaptite de la temo mi plu serĉis en aliaj retejoj por kompletigi la liston, kaj aperis, ke en 1907 naskiĝis Oscar Niemeyer, la plej elstara el la brazilaj arkitektoj.

Al tio ĉio sumiĝas pluraj aliaj okazintaĵoj, kiuj iumaniere famiĝis, kaj la listo fariĝus longega se estus aldonitaj la nefamaj.

Kun bedaŭro mi konstatis, post konsulto en diversaj retejoj, ke la naskiĝo de Zamenhof forestas. La homo, kiu iniciatis la lingvon de tutmonda komunumo kaj tiel kreis la bazon de novtipa kulturo, restas anonima por la plejparto de la homoj, kiuj ne havas rilaton al Esperanto.

Tamen, ene de la movado, eĉ la ĵusaliĝintoj ekscias pri Doktoro Esperanto. Ne multaj poste detale konatiĝas kun lia historio, kaj tiel ili restas apartaj de interesaj sciindaĵoj pri la Zamenhofa vivo, sed almenaŭ la 15a tago decembra fariĝas grava por ili.

Mi alvenis al la konkludo, ke necesas pli vasta kaj abunda priesperanta informado en la mondo por omaĝi famulon, kiu pensis al ĉiuj mondanoj kiam li eksentis la bezonon pri internacia lingvo.

Ĉar ni esperantistoj estas la konantoj de la Zamenhofa vivo, ni ne rajtas atendi, ke aliaj faru tiun informan taskon; ni mem devas utiligi ĉiujn rimedojn por konatigi la mondon kun nia famulo. Ni eku! Kaj se iam en la retejoj aperas la nomo de nia doktoro en la decembra listo de okazintaĵoj, ĉiu el ni estos kontenta pro la sukcesa agado.

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

* <http://www.elalmanaque.com/efemerides/Diciembre/diciembre.htm>,



Kubaj esperantistoj celebras la 15an de decembro 2006 en Guanánamo. Foto: Norberto Díaz Guevara.



La decembra renkontiĝo en Guantánamo

Decembro diversmaniere havas festan etoson, sed la Kuba esperantistaro bonvenigas ĝin kun la kontento partopreni la Zamenhofan Meticjon, kiun de antaŭ ok jaroj organizas la Guantánamo grupo, kaj kiu kun la paso de la tempo fariĝas pli riĉenhava kaj de Esperanta kaj de ĝenerala kultura vidpunkto.

De la 15a ĝis la 17a de decembro, pli ol kvardek esperantistoj el 6 provincoj de la lando renkontiĝis en la popola kampadejo Cajobabo [kahobabo], kiu troviĝas en apudmara regiono rekte rilata al la kuba historio: je malpli ol 100 metroj de la sidejo staras la domo de kampulo Salustiano Leyva, kiu konatiĝis kun José Martí okaze de ties elŝipiĝo en 1895. Kadre de la programo okazis vizito al la domo, kiu nun estas muzeo, kaj ĉiuj atente aŭskultis la eksplikojn kaj rakontojn de la specialistoj, kaj rigardis la ekspozitaĵojn.

La diversaj programeroj – inter kiuj ankaŭ estis tempo por kontakto kun la naturo, bano en maro kaj rivero, sportumado kaj dancado – konsistis el prelego pri la Zamenho-

fa vivo, rondkunsido pri la informa fako, konkurso pri esperantaj konoj, kaj parolado pri la nuntempo kaj perspektivoj de la movado en Kubo. La agrabla vetero ebligis, ke la ĉeestantoj sidiĝis subĉiele inter arboj kaj ĉe freŝa vento.

Ĉefaj motoroj de tiu tradicia renkontiĝo delonge estas Tirso Ávila kaj Leonardo Luna, kiuj kune kun laborema teamo gastigis nin.

La Nacia Estraro de la Asocio estis reprezentata de Julián Hernández, prezidanto; Albania Duthil, kulturo kaj disvastigo; kaj Norberto Díaz, informa fako.

Vere vigla arta vespero kun la ĉefrolulo de esperantistoj el urbo Bajamo, provinco Granma, kiuj prezentis folkloran artaĵon kaj dancokoreografion, allogis eĉ neesperantistojn, el kiuj kelkaj interesiĝis pri la lingvo kaj petis informojn, dum la amplifiloj de la dancejo aŭdigis Esperantan muzikon.

La adiaŭo estis nur portempa, ĉar inter laŭdoj kaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj, estis anoncita de la organizantoj la renkontiĝo 2007.

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

Gvidlinioj por informado pri Esperanto

En la lastaj jaroj UEA donas specialan atenton al la informa agado. Jen aktuala teksto, kiu listigas kelkajn konsiderojn por objektiva informado. Fonto: <http://www.uea.org>

En la rubriko "Malferme" de *Esperanto* (oktobro 2000), estrarano Kalle Kniivilä verkis pri la fono kaj celoj de la *Gvidlinioj*. Li memorigis pri la *Principaro de Frostavallen* el 1956. La ĉefa konkludo de tiu baza dokumento pri informado ne perdis aktualecon. Por sukcesa informado necesas profundaj konoj kaj klara konscio pri la valoro de la fenomeno Esperanto. Nur per sufiĉaj scioj oni povas kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Tial la unua tasko de informanto estas informi sin mem, kaj tiu lernado neniam ĉesas.

Kompare kun la *Principaro de Frostavallen*, la *Gvidlinioj* ne enhavas liston de ĉefaj eraroj nek instrukciojn pri insignoj kaj vestaĵoj. Kniivilä klarigas, ke pozitiva instigo pli inspiras al sukcesa informado ol listo de malpermesoj. La Esperanto-movado ne plu estas movado de stranguloj, kiujn oni devas admoni al deca konduto.

Por ke la *Gvidlinioj* fariĝu kiel eble plej rapide kaj vaste komuna posedaĵo de ĉiuj esperantistoj, la E-gazetoj k.a. informiloj estas petataj reprodukti la tekston. La *Gvidlinioj* estas ankaŭ bonega diskutmaterialo por kluboj, progresigaj kursoj kaj E-aranĝoj.

CELOJ

Konsciigi la publikon pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo

Ĉia informado pri Esperanto estas senperspektiva, se la celgrupo ne konscias pri

la ekzisto de lingva neegaleco kaj la nedemokratieco de la nuna internacia lingva ordo. La unua celo de la informado devas sekve esti ke la ĝenerala publiko malkovru la fundamentan nedemokratiecon de komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn sed postulas de aliaj jarojn da penoj por atingi tamen malperfektan lingvoscion. En la strebado estigi diskuton pri lingva egaleco kaj lingvaj rajtoj troveblas multaj potencialaj aliancanoj kun similaj celoj. Ekzistas multaj sciencaj verkoj pri la efikoj de lingva neegaleco je tutmonda, loka kaj individua niveloj. Indas, ke respondeculoj pri informado bone trastudu la temon. Por ŝanĝi la realaĵojn necesas unue ĝisfunde ekkoni ilin.

Konsciigi la publikon pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto

Esperanto estas unika fenomeno, kaj antaŭ ĉio necesas ke la esperantistoj mem plene konsciu pri tio. Ĉiu esperantisto povas rakonti pri personaj spertoj kiuj ofte estas tute neimageblaj al eksteruloj. Konkretaj spertoj kaj veraj homoj el foraj landoj estas la plej konvinka rimedo por atentigi la publikon pri la ekzisto de tiu fenomeno. Gravas ja ke la informado ne estu tro abstrakta, imponi povas personaj riĉigoj pere de Esperanto, emociaj kaj intelektaj. Informado pri Esperanto devas unuavice esti ĝuste informado, ne propagando. En informado ĉefan rolon havu veraj informoj, ne sloganoj (lingvo de paco kaj amikeco, ĉies dua lingvo ktp.).

Ne ĉiu volas lerni Esperanton, sed multo estas atingita, se oni sukcesas konsciigi pli vastan publikon pri tio ke Esperanto estas vera vivanta lingvo kun parolkomunumo kiu ampleksas la tutan mondon, lingvokomunumo en kiu ĉiu ano povas senti sin plenrajta membro. Jam tio estas revelacio por la plej multaj homoj. Por efike informi pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto necesas ke la esperantistoj mem pli profunde konu la fenomenon Esperanto, kaj sekve pli kuraĝe argumentu kontraŭ eraraj prezentoj.

Proponi Esperanton kiel solvon en konkretaj situacioj

Nur post kiam la unuaj du celoj estas almenaŭ parte atingitaj, eblas serioze proponi uzon de Esperanto kiel solvon en iuj konkretaj situacioj. Necesas ĉiam konscii, ke Esperanto ne estas magia bastoneto, kiu per unu frapo povus forigi ĉiujn problemojn de lingva neegaleco. Antaŭ ol proponi Esperanton en konkreta situacio, necesas ĝisfunde pripensi, kiun precizan rolon Esperanto povus havi, kiaj estus la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kaj kiaj estos la argumentoj de la kontraŭuloj. Sed en kazoj kie la avantaĝoj estas klaraj kaj la kontraŭargumentoj facile refuteblaj, oni kuraĝe faru sian proponon, aŭ se eble, simple ekuzu Esperanton.

Kuraĝigi al lernado de Esperanto

Lerni Esperanton volos unuavice homoj kiuj konscias pri la problemoj en la nuntempa internacia lingva ordo aŭ sentas sin altirataj de la tutmonda egaleca lingvokomunumo de la Esperanto-parolantoj. Sekve la plej bona maniero varbi kursanojn estas konsciigi la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj pri la ekzisto de tutmonda, egalece funkcianta lingvokomunumo, en kiu ĉiuj bonvenas. Malmultaj deziros ekleri Espe-

ranton nur pro tio ke ĝi estas relative facila lingvo. Ne la gramatikaj detaloj sed la fakto ke ĉiu povas igi Esperanton sia propra lingvo, igas ĝin unika kaj lerninda.

RIMEDOJ

Je la nivelo de UEA

Unuaviciaj celgrupoj: Landaj Asocioj de UEA; internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj, organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; la informita ĝenerala publiko tutmonde, sed aparte en landoj, kie ne ekzistas organizita Esperanto-movado.

Taskoj: Gvidado de la informa agado je landa nivelo; kontaktoj kun internaciaj organizaĵoj kaj laŭeble informado rekte al la monda publiko; ĝenerala informado en regionoj sen organizita movado. Por subteni la informan agadon je landa nivelo la Informa Fako de UEA strebu regule disponigi al la Landaj Asocioj gazetarajn komunikojn kaj pretajn modelajn artikolojn facile tradukeblajn kaj adapteblajn al lokaj cirkonstancoj. UEA ankaŭ strebu disponigi en siaj Interretaj paĝoj koncizajn respondojn al oftaj demandoj pri Esperanto kaj kolekton de modelaj informiloj diverslingvaj. Ĉe internaciaj organizaĵoj UEA unuavice flegu la rilatojn, informu pri la esperantista agado kiu konformas kun la celoj de la koncernaj organizaĵoj kaj tiel montru la utilon de pluaj kaj pliaj kontaktoj por ambaŭ partioj. UEA ankaŭ laŭeble strebu konsciigi respondeculojn de la organizaĵoj pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo, sed tiuj strebadoj ne malutilu al la bonaj rilatoj kun la koncernaj organizaĵoj. UEA aktive serĉu kontakton kun medioj kie oni diskutas problemojn rilatajn

al lingva egaleco kaj tutmonda komunika-
do, kaj senpacie informu pri la ekzisto kaj
funkciado de Esperanto.

JE LA NIVelo DE LANDAJ ASOCIOJ

Unuaviciaj celgrupoj: Lokaj grupoj kaj
individuaĵaj membroj de la Asocio; landnivele
aŭ internacie agantaj, influ-kapablaj
organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam intere-
siĝas pri lingvaj rajtoj; naciaj aŭ lokaj
organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas de-
mandoj pri egaleca komunikado; ĵurnalis-
toj de tutlandaj amaskomunikiloj kaj la ĝe-
nerala informita publiko.

Taskoj: La ĉefa respondeco pri informa
laboro kuŝas ĉe la nacia nivelo. La landa
asocio provizu la lokajn grupojn kaj la indivi-
duajn membrojn per aktuala kaj profesie pro-
duktita inform-materialo, starigu rebat-ser-

von kiu rapide reagu al eraraj prezentoj de
Esperanto en tutlandaj kaj lokaj amasko-
municiloj, kaj ĝi aktive kontaktu organizaĵojn
kaj individuojn kiuj povas interesiĝi pri ega-
leca tutmonda komunikado.

JE LOKAJ KAJ INDIVIDUA NIVelo

Unuaviciaj celgrupoj: Lokaj organizaĵoj
kaj individuoj kiuj interesiĝas pri lingvaj pro-
blemoj, ĵurnalistoj de lokaj amaskomuniki-
loj kaj la ĝenerala publiko.

Taskoj: Informado pri konkretaj aranĝoj,
kontaktoj kun lokaj ĵurnalistoj. La individuaĵaj
esperantistoj mem estu pli forte konvinki-
taj pri la valoro de la fenomeno Esperanto,
kaj ili havu sufiĉajn sciojn por kuraĝe kaj
konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezen-
toj. Pli gravas la kvalito ol la kvanto de la
informado.

movado

2006: Agado en filioj

- Renkontiĝo en Jiguaní, provinco Granma, kun ĉeesto de esperantistoj el Ciudad de La Habana, Camagüey, Granma, Santiago de Cuba kaj Guantánamo.
- Zamenhofa Tago en municipo Imías, provinco Guantánamo, kun partopreno de 44 Esperantistoj el 6 provincoj.
- Prelegoj kaj libro-prezentoj okazis en Florida, provinco Camagüey, dum la vizito de s-ro Juri Joeri, el Nederlando.
- En Cascorro, provinco Camagüey, okazis interŝanĝa renkontiĝo kun Esperantistoj el la provinco Granma.
- En Cienfuegos okazis kultura aranĝo kadre de la agotagoj omaĝe al José Martí, en la provinca biblioteko.
- Danke al interprovinca kunlaboro okazis du aranĝoj de la Yumeiho-grupo de Havano, en municipo Contramaestre, provinco Santiago de Cuba.

L. L. Zamenhof

*Jen kelkaj interesaj detaloj de la vivo de Zamenhof, kiuj aperas en Vikipedio.**

Fonto: http://eo.wikipedia.org/wiki/L._L._Zamenhof

Zamenhof naskiĝis en la Ulica Zielona 6 en Bjalistoko (tiam en la Rusa Imperio de la caroĵ, nun en Pollando). Lia naskiĝtago estis la 3a de decembro laŭ la julia kalendaro, la 15a de decembro laŭ la gregoria kalendaro (hodiaŭ festata kiel Zamenhofs tago) kaj la 19a de kislew laŭ la juda. Li estis filo de lingvoinstruisto Mordehaj Zamenhof (kiu ruse preferis Marko) kaj Rozalio (naskita Sofer). Lia familio estis litvaj (ne litovaj!) judoj. Lia-



Lejzer Ludwik ZAMENHOF (pseŭdonimo: doktoro Esperanto; naskiĝis la 15an de decembro 1859 en Bjalistoko; mortis la 14-an de aprilo 1917); nomata "La Majstro", li estis la iniciatinto de Esperanto.

dire, li estis *rusianda hebreo*. Laŭ Edvardo Wiesenfeld Zamenhof sentiĝis kiel Polo kaj en lia hejmo oni parolis en pola lingvo. Tiu anonco estis tamen multfoje diskutita kaj neniam pruvita. Pri Poleco de la iniciatinto konvinkiĝis fervore Leo Belmont kiu en siaj poemoj skribas pri Zamenhof kiel "la filo de pola tero". Ankaŭ Antoni Grabowski kaj Adam Zakrzewski parolis pri li kiel pri la samnaciulo. Tio tamen ne pravas, ke Zamenhof sentis sin Polo kvankam laŭ etniko li estis (vivis inter Poloj, parolis en pola lingvo, legis kaj tradukadis polan literaturon).

Li plenaĝiĝis en la urbo Bjalistoko, kiu havis multajn lingvojn kaj multajn miskomprenojn.

Li studis medicinon en Moskvo (1879-1881) kaj Varsovio (1881-1885). Li fakuliĝis pri okuloj en Vieno (1886).

La primitiva formo de Esperanto ("Lingve universala") estis preta en la komenco de la vintro 1878 kaj Zamenhof kun siaj gimnaziaj kolegoj aranĝis en sia ĉambreto feston, kiun ili nomis "tago de vivigo de la universala lingvo". Sed li ne ĉesis prilabori ĝin: en la jaro 1881 ni konas tri formojn malsamajn de la lingvo, kaj en 1885 li donis al ĝi la definitivan aspekton. Poste li devis atendi ankoraŭ du jarojn antaŭ ol trovi eldoneblon.

La 26an de julio 1887 li povis eldoni la Unuan Libron danke al la helpo de la patro de Klara Zamenhof (naskita Silberniki), al kiu li edziĝis samjare la 9an de aŭgusto. Lia unua filo, Adamo, naskita en 1888, fariĝis okulisto, kaj anstataŭis sian patron, fine de

ties vivo, en la domo ĉe la strato Dzikaj, lia unua filino, Sofio, naskita en 1889, fariĝis kuracistino; lia dua filino, Lidja, naskita en 1904, plej fidele sekvis la vojon de sia patro, instruante Esperanton. Ŝi aliĝis al la Bahaa Kredo.

De novembro 1897 li loĝis en Varsovio, strato Dzikaj 9, en la malriĉa hebrea kvartalo. Kaj en 1905, la unuan fojon post 20 jaroj, li havis la eblon ĝui kelksemajnan libertempon kaj entreprenis kun sia edzino vojaĝon al la Bulonja kongreso. Poste danke al la sumoj, kiujn pagadis al li *La Revuo* pro lia konstanta kunlaborado, li povis ĉeesti ĉiujn kongresojn, eĉ tiun de 1910 en Vaŝingtono (Usono). De 1905 ĝis la unua mondmilito lia vivo fluis trankvile kaj laboreme; la tutan tagon li okupiĝis pri sia profesio, nur la vesperon li povis dediĉi al siaj ambaŭ idealoj, internacia lingvo kaj sennacia religio; inter ili du li dividis siajn fortojn kaj tempon.

Sur la Esperanto-kampo, liaj tradukoj aperadis regule, kun ĉiam pli granda sukceso.

Li publikigis en 1906, en Rusujo, anoniman broŝuron pri Homaranismo, titolo per kiu li anstataŭis Hilelismon. De Beaufront tre akre kritikis ĝin en *L'Esperantiste*, kaj Zamenhof respondis al li, sed ĉiam anonime.

En julio 1911 li prezentis al la Internacia Kongreso de Rasoj, en Londono, memuaron, en kiu li asertis, ke "la intergenta diseco kaj malamo plene malaperos nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion". Poste, por povi pli facile defendi siajn ideojn, ne kaŭzante malprofiton al la Esperanta afero, li en 1912, dum la Kongreso en Krakovo, rezignis ĉian oficialan rolon en la aferoj de Esperanto, kaj eĉ la simplan titolon "Majstro". Kaj ekde la sekvinta jaro li publikigis sub sia nomo novan, pli ampleksan eidonon de la antaŭa broŝuro, kun la titolo *Deklaracio de Homaranismo*. Evidente li volis aludi kaj kompletigi la *Deklaracion pri Esperantismo*, kiun li prezentis en Bulonjo.

Nomoj: La hebrea antaŭnomo de Zamenhof estis Eliezer, kaj li ricevis, ĵusnaskita, kroman sekularan (kinuian) nomon Lejzer, jida versio de Eliezer. Vere, la E-antaŭnomo Lazaro estas juddevena, sed ankaŭ kristana (estas du Lazaroj cititaj en Evangelioj, kaj estas Sankta Lazaro ktp). La rusan Ljudovik / Ljudvik (ruse: Ljudovik / Ljudvik; germane: Ludwig; pole: Ludwik; angle: Ludwig aŭ Ludovic), li elektis kiel gojan nomon (kinuion) honore al Francis Lodwick aŭ Lodowyc, kiu publikigis en 1652 projekton pri planlingvo, pri kiu Zamenhof legis en verkoj de Komenio. Tiu ŝanĝo okazis nur kiam li iris al universitato en Moskvo. La skribformo Zamenhof anstataŭ Samenhof (kiu signifas germane "semkorto") aperis nur post la unuaj jaroj de disvastigo de E. En la fino de la 19a jarcento, lia frato Leon Zamenhof doktoriĝis kaj ekis subskribi "Dr. L. Zamenhof", pro tio, li reprenis Lejzer en 1901 kaj subskribis Dr. L. L. Zamenhof.

Pseŭdonimoj: Gamzefon (Hamzefon); Hemza; D-ro Esperanto; Amiko; N.N.; Anna R.; Unuel; Homo sum; Homarano; D-ro X.

Lingvoj: Gepatra: rusa. Parolkapablo: jida (li verkis gramatikon), pola, germana, Esperanto. Legokapablo: franca, helena, latina, itala, angla, hebrea, aramea, Volapuko. Iom da scio: hispana, litova. Lia patrino parolis al li en la jida lingvo, lia patro en la rusa, en kiu okazis ankaŭ la instruado de Zamenhof. Li ŝatis la rusan super ĉiuj aliaj lingvoj. En letero de la 8a de marto 1901 (al Th. Thorsteinsson) li skribis: "Mia gepatra lingvo estas la rusa; sed nun mi parolas pli pole..." Li do akiris scipovon de la pola je nivelo komparebla al tiu de denaskulo. Al siaj gefiloj li hejme parolis pole.

Parodioj kaj karikaturaj: Tiu figuro, neeviteble konata de la E-parolantoj, eĉ ne speciale movademaj, senmanke estas potenciala fonto por karikaturaj kaj parodioj. Tamen konstatablas, ke ili malmultas. Ni citu: **SuperZam**, *La aventuroj de SuperZam* de iu JANO, aperinta po-pece en *Kial Ne?* de JEB, eble en la 70aj-80aj jaroj. **Zorhof**, komiksulo de Serge Sire, multfoje aperinta en *La KancerKliniko*, en kiu Zamenhof ludas la maskitan rejustiganton Zorro. **Zamenho-ro**, komiksulo de HÔDÔS, aperinta en Volapük, (alia traktado de Zamenhof kiel Zorro).

Trajtoj: Zamenhof estis malaltstatura, kun brunegriza barbeto, granda frunto, kaj kalva kapo; li portis pormiopajn okulvitrojn; li misprononis la sibilantajn konsonantojn; jam de ĉirkaŭ 1900 li suferis je malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj. Li estis pedante ordama en la ordinara vivo, naŭva en aferoj, timema antaŭ publiko, malinklina al ĉiuj oficialaj ceremonioj, nature modesta kaj pacama, li penis mildigi ĉiujn konfliktojn; li havis plej profundan senton pri justeco: en la Unua UK li memorigis en sia malferma parolado pri Schleyer, aŭtoro de Volapük, kies disĉiploj tamen siatempe akre atakis lin. En la Dua UK, pere de Michaux, li invitigis, siajn rivalojn, interalie Peano-n, aŭtoro de Latino sine flexione. Sed plej gravaj trajtoj de lia karaktero estas la volo, per kiu li ĉion oferis por siaj idealoj, kaj la pacienca obstino, per kiu li laboris por ilia efektigo; cetero tiun volon kaj tiun obstinon li ĉerpis el la senmezura amo, kiu puŝis lin alporti, per ĉiuj fortoj de sia korpo kaj spirito, ĉion da helpo al la homaro.

En tiu momento, li ekpensis pri kongreso inter homaranoj kaj komencis klopodojn pri tio kiam subite eksplodis la unua mondmilito. Ĝi surprizis Zamenhofon en Kolonjo, survoje al Parizo. Li devis reatingi: Versovion tra Svedujo kaj Finnlando. Enfermite en sia urbo pro la batalego, baldaŭ en sia ĉambro pro la malsano, li daŭrigis sian nelacigeblan agadon. Li finis la tradukadon de la kvar volumoj de la Andersen-fabeloj, kaj de la tuta Malnova Testamento; samtempe li pretigis cirkuleron alvokantan kunvenon de intelektuloj por prepari ĝeneralan universalan kongreson por neŭtrale-homa religio; li skizis grandaniman *Alvokon al la Diplomatoj*, publikigotan post la Granda Milito. Inter tiuj zorgoj la morto kaptis lin la 14an de aprilo 1917. La entombigo de L. L. Zamenhof okazis la 16an de aprilo.

Zamenhof mem rakontas

La jenon skribis Zamenhof en letero al Alfred Michaux, prezidanto de la Bulonja Grupo, la 21-an de februaro 1905, publikigita en *Enciklopedio de Esperanto*.

"Kara sinjoro:

"Vi petas, ke mi donu al Vi detalojn pri mi kaj mia vivo. Tre volonte mi tion ĉi faros, kiom mi povos, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas la kaŭzoj: por la estontaj generacioj mia biografio eble estos ne seninteresa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun prezentas unu konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj: a) interne en mi konstante bataladis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiujn reciproke interkonsentigi estis ofte treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis; b) ekstere mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj en modo kaj tiaj neniam mankis al mi mo-

kantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj havis grandajn kaj tre turmentajn klopodojn kun la akirado de mia pano kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano jam al mi ne mankas; sed ho ve, la longa batalado min tre lacigis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60-jara.

"Mi naskiĝis en Bjalystok la 15an de decembro 1859. Miaj patro kaj avo estis instruistoj de lingvo. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t. e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (marĝene: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere parolis nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.

"En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur senrajtan fremdulon (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praaŭoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimias kaj premegas miajn fratojn; mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas... kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komecis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malape-

ros ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plenrajte al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn.

"En la jaro 1869 mi eniris en la Bjalistokan realan gimnazion; sed post du monatoj mi devis eliri pro grava malsano (en mia infaneco mi tre ofte estadis malsana); en 1870 mi eniris denove kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj (mi devas rimarki, ke en la tuta 9-jara daŭro de mia gimnazia lernado, kiel en Bjalystok, kiel poste, en Varsovio, mi estis ĉiam la unua en mia klaso; la instruantoj rigardadis min kiel treege kapablan kaj miaj kolegoj profetadis (marĝene: sen ia envio, sed tre bondezire, ĉar neniam mi havis inter la kolegoj ian malamikon), ke mi havos en la vivo ĉiam la plej grandajn sukcesojn; tio ĉi tamen poste tute ne plenumiĝis kaj mi longe devis batali ĝis mi ellaboris al mia familio modestan panon).

"En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis al Varsovio, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de germana lingvo en la reala gimnazio. Mi restis 5 monatojn dome por lerni la lingvojn latinan kaj grekan, kaj poste mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion, kiun mi finis en la jaro 1879.

Zamenhof en 1867





"Tiam mi forveturis Moskvon kaj eniris tie en la medicinan fakultaton de la tiea universitato. Miaj Moskvaj kolegoj estis reprezentantoj de tre multaj plej diversaj rasoj, kaj tio ĉi fortikigis en mi la celadon al unuigita homa familio. Baldaŭ la financa stato de miaj gepatroj fariĝis tre malbona, ili ne povis jam tenadi min en Moskvo, kaj tial en 1881 mi revenis Varsovion, eniris tie en la universitaton, kiun mi finis en la komenco de Januaro 1885.

"Mi forveturis tiam en la vilaĝon Vejseje, por komenci kuracistan praktikon. Praktike tie en la daŭro de 4 monatoj, mi konvinkigis, ke mi por la komuna medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi estas tro impresigema kaj la suferoj de la malsanuloj (precipe de la mortantoj) tro multe min turmentis.

"Tiam mi revenis Varsovion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn de okuloj. Mi laboris en la daŭro de 6 monatoj en la okulista apartaĵo de unu

Varsovia malsanulejo, poste mi lernis kelkan tempon en la klinikoj de Vieno (Aŭstrujo) kaj en la fino de 1886 mi komencis okulistan praktikadon en Varsovio.

"Tiam mi konatiĝis kun mia nuna edzino, Klara Zilbernik el Kovno (ŝi tiam gastis ĉe sia fratino, loĝanta en Varsovio). La 9-an de Aŭgusto 1887 mi edziĝis. Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis al mia tuta dispozo la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio ĉi donis al mi la ebion, post longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni mem (marĝene: en julio 1887) miajn unuajn kvar broŝurojn (lernolibro de Esperanto en lingvoj rusa, pola, germana kaj franca). Baldaŭ poste mi eldonis la "Duan libron", "Aldonon", "Neĝan Blovadon" kaj "Gefratojn" (verkitaj de Grabowski), tradukon de "Dua Libro" kaj "Aldono", mezan vortaron germanan, plenan vortaron rusan, anglan kaj svedan lernolibron, Princinon Mary, Adresaron ktp., kaj mi ankaŭ donis la necesan monon por la eldono de la verkoj de Einstein kaj H. Phillips. Mi ankaŭ donis multajn anoncojn en la gazetoj, dissendis grandan nombron da libroj ktp.

"Esperanto baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ formaniĝis, ĉar la enspezoj de mia kuracista praktiko estis terure malgrandaj. En la fino de 1889 mi restis sen kopeko!

"Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi devis forlasi Varsovion kaj serĉi mian panon en la alia loko. Mia edzino devis forveturi kun mia infano al sia patro kaj mi veturis (en Novembro 1889) en la urbo Herson (suda Rusujo), kie ne estis okulistoj (marĝene: tie estis nur unu okulistino), kaj kie mi tial esperis trovi panon por mia familio. Sed mia espero min terure trompis: miaj tieaj enspezoj ne sole

ne donis al mi eblon nutri mian familion, sed eĉ por mi mem ili ne sufiĉis malgraŭ mia tre modesta kaj tre avara maniero de vivo! Mi simple kaj litere, ofte, ne havis eĉ kion manĝi: tre ofte mi restadis sen tagmanĝo! Nek mia edzino, nek miaj parencoj ion sciis pri tio ĉi, ĉar mian edzinon mi ne volis malĝojigi, kaj en miaj leteroj mi konstante konsolis ŝin, ke estas al mi tre bone, ke mi havas tre bonajn esperojn, ke mi baldaŭ venigos ŝin al mi ktp. Tamen fine mi ne povis jam pli elteni kaj mi devis konfesi al mia edzino la tutan mian staton. Mi estis tiam ankoraŭ tro fiero, por akcepti de iu monan helpon; tamen la malĝojego kaj la insistaj petoj de mia edzino devigis min akcepti monan subtenadon de mia bopatro (kiu tiam kaj ankaŭ poste neniam rifuzadis al mi sian helpon kaj elspezis por mi tre multe da mono) kaj mi revenis Varsovion, esperante, ke nun mia kuracista praktiko iros pli bone. En Majo 1890 mi revenis Varsovion.

"Ankaŭ tiun ĉi fojon la espero min trompis. Miaj enspezoj tute ne pligrandigadis, miaj ŝuldoj kreskadis. Fine ne havante jam la eblon pli atendi, mi en Oktobro 1893 transloĝiĝis kun mia familio en la urbon Grodno. Tie miaj enspezoj estis pli grandaj ol en Varsovio kaj la vivo estis malpli kara. Kvankam ankaŭ en Grodno miaj enspezoj tute ne kovradis miajn elspezojn kaj mi devis ĉiam ankoraŭ prenadi subtenon de mia bopatro, tamen mi paciencie tenis min tie en la daŭro de 4 jaroj. Sed ĉar miaj infanoj pligrandigadis kaj postulis pli koston edukadon kaj la urbo Grodno estas tiel malriĉa, ke okulisto neniam povos tie multe pligran-

digi siajn enspezojn, tiel laŭ la insista deziro de mia bopatro mi en la fino de 1897 decidis denove reveni Varsovion kaj fari tie ĉi la lastan provon.

"La stato de mia animo estis tiam terura. Mi sentis tre bone, ke tio ĉi estas mia lasta provo, kaj se ĝi ankaŭ nun ne sukcesos al mi, mi estas perdita. En la daŭro de la unua jaro mi preskaŭ freneziĝis de malespero. Sed fine, dank' al la lasta ŝtreĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Baldaŭ mia kuracista praktiko komencis pli kaj pli grandiĝadi kaj jam de la jaro 1901, ĝi estas tiel granda, ke miaj enspezoj tute kovras miajn elspezojn. Mi estas savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon, kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio (kvankam kompreneble mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon). Mi loĝas en unu el la plej malriĉaj stratoj de Varsovio, miaj pacientoj estas homoj malriĉaj kaj pagas al mi tre malmulte; mi devas akceptadi 30-40 pacientojn ĉiutage, por havi de ili tiom, kiom aliaj kuracistoj havas de 5-10 pacientoj; tamen mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam nenies helpon.

"Mi havas nun 3 infanojn: unu filon kaj du filinojn.

"Mi estas tre laca kaj lacigis ankaŭ Vin per mia longega letero.

"Adiaŭ! Via L. L. Zamenhof."

* Vikipedio estas reta enciklopedio, kie vizitantoj rajtas anonime aldoni tekstojn.

24a Komitatkunsido de Kuba Esperanto-Asocio

Havano, 26a-27a de januaro 2007

Pinta laborkunsido de la kuba esperantistaro

La Zamenhofaj Metiejoj

Post sukcesa organizado de la kunsido de la orienta grupo en 1995, konsistanta el la provincoj Santiago de Cuba, Granma kaj Guantánamo, la provinca estraro de Guantánamo interkonsentis organizi samjare en decembro, por omaĝi la iniciatinton de Esperanto, naciajn Metiejon (ĉar ĝis tiam neniu periode okazis), kiu donu ŝancon al novuloj partopreni.

Tiel, de la 15a ĝis la 17a de decembro 1995 okazis en urbo Guantánamo la unua nacia renkontiĝo omaĝe al Lazaro L. Zamenhof, kun partopreno de esperantistoj el provincoj Granma, Santiago de Cuba kaj Guantánamo.

La sidejo de la evento estis la provinca centro de komunuma kulturo, kaj okazis vizito al Mambisado Guantanamero sub gvido de loka universitata profesorino, kiu impone disertaciis pri la historio de la loko, kie troviĝas la postrestaĵoj de la piej elstaraj *mambioj** batalintaj dum nia sendependiga milito.

Ankaŭ la postaj eventoj okazis en urbo Guantánamo, ĝis 1998. Krom prelegoj pri la vivo de Zamenhof okazis ankaŭ vizitoj al kulturejoj, kaj vizito al la Ŝtona Bestoĝardeno, (unika en la lando), al la placo Mariana Grajales kaj al aliaj interesaj lokoj.

La kulturaj aranĝoj realiĝis precipe en la provinca kulturdomo, en la domo de la Juna Kreanto kaj en la Centro de Komunuma Kulturo.

Iom post iom multnombriĝis la partoprenantaro kaj pliaj provincoj sendis reprezentantojn. En 1996 ne okazis renkontiĝo, ĉar

la kunsido de la KEA-komitato efektiviĝos en 1997, kaj oni decidis samdatigi ambaŭ eventojn.

La urbo Baracoa estis la sidejo de la renkontiĝo en 1999 kaj en 2000. La loĝejo estis la ripozdomo de la Ministerio pri Agrikulturo, kie realiĝis la programaro de la unua tago, kaj la sekvintaj sesioj disvolviĝis en la muzeo Matachín, la kulturdomo kaj la kinejo. Estis vizitataj historiaj lokoj, i.a. la preĝejo de la urbo Baracoa, kaj estis tempo por ĝui la lokan popolan feston konatan kiel Barakoaj Noktoj.

Notindas, ke pro intereso de la partoprenantoj, dum la unua vizito al Baracoa ni ĉeestis tipan kulturelan aranĝon nomatan *Bembé*, kiu estas festo dediĉata al la sanktulo Sankta Lazaro, kies tago estas la 17a de decembro.

La alloga ĉirkaujaĵo de la sidejo kaj la gastigemo de la loĝantoj ĉiam estas stimuloj por pensi pri reveno dum la adiaŭo.

En 2001 la sidejo estis la kampadejo Yacabo [jakabo], taŭga loko por nia evento: komfortaj dometoj, bela pejzaĝo, bona atenco de la laboristaro, partopreno de lokaj loĝantoj, kaj tio estis bonaj kialoj, por ke la kampadejo fariĝu konstanta sidejo. Estis vizitataj la loka muzeo, la biblioteko, kaj okazis renkontiĝo kun lernejoj infanoj. En la kampadejo mem okazis la prelegoj kaj la artaj kaj distraj aranĝoj. Estis multnombra partopreno el pluraj provincoj.

En 2002 ni reprenis kiel sidejon la kampadejon Yacabo, kun la kutima gastigemo de la laboristoj, kaj tiam estis ŝanco vojaĝi

al Playitas de Cajobabo, kie okazis la elŝipigo de nia nacia heroo José Martí. La prelegoj okazis kun notinda partopreno de lokaj loĝantoj, kiuj montris intereson pri nia afero Esperanto.

Ni revenis al Guantánamo en 2003. La sidejo estis la hotelo El Molino, kaj ankaŭ tie estis bona atentemo de la laboristaro. Pro la bona organizado, la kultura partopreno kaj la prelegoj pri Esperanto, la prestiĝo de la evento daŭre kreskis. La laboristoj de la hotelo ĝuis nian aranĝon kaj estis kontentaj pro nia restado.

Baracoa denove bonvenigis nin en la jaro 2004, samkiel la ripozdomo de la ministerio pri agrikulturo, kiel sidejo. Tiam la pluvo ferocce klopodis malsukcesigi la eventon, sed sen favora rezulto.

En tiu jaro la nomo de la renkontiĝo estis Nacia Ronddebato Lazaro L. Zamenhof, sed la celoj estis la samaj: kunigi Esperantistojn el la tuta lando por omaĝi la naskiĝdatrevenon de la iniciatinto de Esperanto, diskonigi kaj praktiki la lingvon. Okazis vizitoj al muzeo, al la preĝejo kie troviĝas la kruco

konstruigita de Kristoforo Kolumbo okaze de ties unua vojaĝo al Ameriko. Krome, estis vizitata la municipa radiostacio, kie realiĝis grava interŝanĝo kun la laboristoj.

En 2005 la sidejo estis la kampadejo Yacabo, kie la kondiĉoj estas tre favoraj al tiutipa renkontiĝo. Estis tiel, ke Julián Hernández Angulo, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, tiam sugestis, ke oni konsideru la lokon daŭra sidejo de la evento. Partoprenis Esperantistoj el Granma, Santiago de Cuba, Florida, Cascorro, Sancti Spiritus, Ciudad de La Habana kaj Guantánamo. Prezentiĝis E-videofilmoj kaj okazis prelegoj i.a. fare de Julián Hernández kaj Norberto Díaz.

Estas notinde, ke kvankam la ĉefa programo celis unuavice plenkreskulojn, la partopreno de infanoj kreskis tiel, ke ni estis devigataj aldoni porinfanajn programerojn.

Cajobabo [kahobabo] estis la sidejo de la lasta renkontiĝo, en 2006. La loko ne estis tiel akorda al niaj bezonoj, sed la partopreno estis notinde granda, kaj la kulturalan aranĝon regis la Esperantistoj de provinco Granma. En la muzeo 11a de Aprilo efektiviĝis la laborsesioj, kio estis tre stimula por la laboristaro, kies direktorino asertis, ke nia decido estis honoro por ili.

Unu el la interkonsentoj de la partoprenantoj, estis profesiigi la renkontiĝon ekde ĉiuj vidpunktoj, ĉar ĝi havas grandan prestiĝon kaj ĝi estas la plej grava evento de la kubaj Esperantistoj por omaĝi la naskiĝdatrevenon de Zamenhof.


En 2007 la aranĝo estos dediĉita al la 110a datreveno de la naskiĝo de Esperanto, kaj la slogano estos "Esperanto: 110 jaroj". Laborsesioj kaj prelegoj rilatiĝos al tiu temo, kaj stimulus la interŝanĝojn kun Esperantistoj de la Kariba kaj Centramerika regionoj.

LEONARDO LUNA NEYRA kaj TIRSO ÁVILA BORY

* *Mambio*, el la hisp. *mambí*: Insurekciulo kontraŭ Hispanio en la sendependigaj militoj en Kubo kaj Dominika Respubliko dum la 19a jarcento.

Kronologio de la Zamenhofaj Meejoj

Jaro	Monato	Partoprenintoj	Loko
1994	Decembro	27	Guantánamo
1995	Decembro	31	Guantánamo
1996	(ne okazis, transdatiĝis al januaro 1997)		
1997	Januaro		Guantánamo
1997	Decembro	43	Guantánamo
1998	Decembro	60	Kampadejo Yacabo
1999	Decembro	47	Baracoa
2000	Decembro	43	Baracoa
2001	Decembro	60	Kampadejo Yacabo
2002	Decembro	60	Kampadejo Yacabo
2003	Decembro	65	Guantánamo
2004	Decembro	46	Baracoa
2005	Decembro	49	Kampadejo Yacabo
2006	Decembro	55	Kampadejo Cajobabo



**Esperanto?
Bona ideo!**

AVANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefono: +53(7)40 4484; Fakso: 649 8729

avanco@esperanto.co.cu

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro